

# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

N-ro 6/1996

NOVEMBRO-DECEMBRO

**SVISA ESPERANTO-SOCIETO**  
**Ĝenerala Kunveno 1996**  
la 23-an de marto  
en la fervoja stacidomo de Neuchâtel

### PROTOKOLO

#### Ĉeestantoj:

Perla MARTINELLI,  
Claude GACOND,  
Ernst von MAY,  
Nicole MARGOT,  
Angelo MELLINI,

prezidanto  
vicprezidanto  
kasisto  
romanda reprez.  
alemana reprez., sekretario,  
protokolanto

kaj 17 pliaj SES-anoj

#### Senkulpiĝis:

Fritz Liechti kaj edzino  
Jean-Jacques Lavanchy  
Didi Weidmann  
Madeleine Stakian  
Marion Grosjean  
Gabrielle Gacond

#### 1. Komunikoj de la prezidanto

Perla Martinelli malfermas la kunsidon je la 10h00 kaj kore bonvenigas ĉiujn ĉeestantojn.

#### 2. Elekto de la tagprezidanto, de la protokolanto, de la voĉnombrantoj

Elektiĝas:

- tagprezidanto: Claude Gacond
- tagprotokolanto: Sonja Brun
- voĉnombrantoj: David Bühlmann kaj Ernst Glättli

Pri la tagordo Giorgio Silber atentigas, ke en la "Diversaj" devas esti menciita propono por la komitato de UEA, kiun li transsendis al la prezidantino. Poste la tagordo, kiu aperis en "SI" n-ro 1/96, estas akceptita.

(atentu noton p.18 sube)

### **3. Aprobo de la protokolo de la pasinta kunveno, kiu aperis en "SI" 5/95.**

Franz Brügger demandas pri la agentejo ARGUS kiu dum la lastaj jaroj ne plu bone laboris. Claude Gacond klarigas ke la kaŭzo estis speciale la reorganizo de ARGUS. Nun la laboro estas normala. Claude Gacond atentigas, ke pri ARGUS ni parolos ankoraŭ sub la punkto 5 "Financa raporto" kaj eventuale ankaŭ sub "Diversaj".

*La protokolo estas aprobata de ĉiuj kun 1 sindeteno.*

### **4. Morala raporto**

Perla Martinelli raportas:

- Okazis 4 kunsidoj de la CK. Ĉiam la tuta CK estis kunvokita, laŭ la decido de la lastjara ĜK ke la Estraro kaj la CK kunfandiĝu.
- Mi daŭrigis la vizitojn al lokaj societoj por plifortigi la ligan inter SES kaj la lokaj societoj, kies dezirojn kaj proponojn mi atentis, ĉar SES devas esti la kunligo de la lokaj societoj.
- Ĉiu membro ricevas regule kaj SI kaj LF. La drasta altigo de la poŝtaj tarifoj ekde 1996 bonŝance ne altigos la koston de nia kolektiva abono al LF, sed por SI ĝi signifas pliajn CHF800.- jare.
- Fritz Liechti petis, ke fine de la mandato il estu liberigita de sia tasko, kiun li skrupule kaj akurate plenumas. Persono por transpreni la taskon de redaktoro de SI estos eble pli facile trovebla, se ni eldonos nur 4 numerojn anstataŭ 6.
- La regionaj semajnfinoj, kiuj okazis en Lugano (ĉefpreleganto d-ro Giorgio Silfer) kaj en Cully (ĉefpreleganto Georges Lagrange) estis kiel kutime granda sukceso. La merkatika seminario en januaro (d-ro Marco Picasso) en Lucerno bone anstataŭis la alemanan semajnfinojn.
- Kiel informado SES daŭre ricevas la gazetajn eltondaĵojn de ARGUS, kiujn Claude kaj Gabrielle Gacond katalogas.
- SES financis diversajn projektojn konforme al akto n-ro 3. Estis donita subvencio al TEL pro ekspozicio en kunlaboro kun esperanta PEN, kiu estis tre bona afero. Venis ne nur ĵurnalistoj, sed eĉ la televido. Poste oni donis subvencion al JES pro aktivecoj en la studenta medio en Ĝenevo kaj al s-ro

von Büren pro staĝo pri informado kaj publikaj rilatoj en la Kvinpetalo. Krome la CK aprobis financan subtenon al la novaĵletero LINGUA, prizorgata de d-ro Carlevaro. Ĝi aperos samtempe kaj laŭ bezone en tri lingvoj, do 3 eldonoj. Sekve estus pli oportune, se ARGUS irus rekte al d-ro Carlevaro, kiu povas utiligi la materialon por tiu-ĉi novaĵletero kaj eble fari fotokopiojn por la grupoj, la societoj lokaj, kiuj interesiĝus pri tio, kontraŭ minimuma repago. Poste la originaloj reirus al CDELI por klasado kiel antaŭe. LINGUA anstataŭos la iaman informilon "Esperanto Information", kiu ekzistis en la germana, en la franca kaj ankaŭ en la itala kaj estis prizorgita siatempe de d-ro Baur. Ĝi celas informi gazetojn kaj aliajn mediojn pri nia interna vivo de esperanto. D-ro Carlevaro pensis pri facila formulo, sendata fakse al la redakcioj de la diversaj periodaĵoj kaj radioj. Koran dankon al li.

- La merkatika seminario en Lucerno, kiun gvidis d-ro Picasso, havis sufiĉe grandan sukceson. Bedaŭrinde kelkaj lokaj societoj ne sendis reprezentanton. Feliĉe ni havas resumon pri la diversaj traktitaj temoj en broŝureto, kiu estis eldonita kiel speciala numero de SI. Pliaj ekzempleroj estas aĉeteblaj ĉe SES. Raporto pri la seminario estis sendita al diversaj esperantogazetoj, eĉ al El Popola Ĉinio, per s-ino Brun.
- Alia punkto estas la rilatoj kun UEA. Pasintjare ni elektis s-inon Elisabeth Lauper kiel komitatanon A. Ŝi reprezentis SES en Tampere kaj donis voĉan raporton. Bedaŭrinde ŝi ĵus rezignis, kaj ni devos elekti novan komitatanon.
- Lucerna Grupo demandis pri la internacia Agotago. Kiel SES-prezidanto mi skribis al UEA kaj ricevis la respondon, ke fakte tiu agotago estas praktike privata afero, kaj ĉiu estas libera en la decido, ĉu partopreni aŭ ne. Do ne estas inter la kompetento kaj deziro de SES ordoni al grupo aŭ loka societo ke ili faru aŭ ne faru tion.
- Dum la kongreso en Tampere s-ino Lauper renkontis problemeton. Temas pri la aliĝo de novaj landaj asocioj al UEA, en teritorioj kie jam ekzistas landa asocio. Por doni konkretan ekzemplon: Temis pri la Katalunoj. Ili estas fakte hispanaj ŝtatanoj, sed ŝtatus esti sendependaj. Jam de longa tempo la katalu-

naj membroj de UEA deziras esti agnoskitaj sine de UEA kiel landa asocio de Katalunio. Ĉar jam ekzistas landa asocio hispana, estiĝis problemo, al kiu s-ino Lauper ne povis respondi, kaj la decido estis prokrastita. Mi ricevis koncernan proponon, kiu estos pritraktita sub "Diversaj".

- La rilatoj inter SES kaj KCE, La Domparo, estas tre bonaj. Laŭ peto de SES la asembleo de KCE proponis solvon por la demando pri ekzamenoj kaj diplomoj de esperanto en Svislando. La kultura Konsilio de KCE prezentis rezolucion, kiu estos diskutita sub punkto 7 de la tagordo. Pro la necerta situacio de GEP, la CK de SES decidis repreni sian monon tie deponitan. KCE helpas al SES reakiri tiun monon, pagante al SES kontante la luon nun postulatan de GEP al KCE, dum ĉiumonate la sama sumo iras al GEP el la SES-konto ĉe GEP, per interna ĝiro. La kasisto, s-ro von May, konfirmas ke la pagoj de KCE ĝis nun regule okazis.
- Pri la financoj kaj stato de la membraro bv. trovi detalojn en la raportoj de la kasisto kaj de la kaskontrolantoj.
- Pri la agado 2003 oni daŭre laboras. Interesa propono: Ĉu ne estus bele kroni tiun datrevenon per Universala Kongreso? Ĉu eventuale iu loka societo, kompreneble kunlabore kun SES, pretus akcepti tiun ĉi defion?
- Perla Martinelli finas la raporton per omaĝo al niaj forpasintaj membroj:  
s-ro Paul Bächli el Ennetbaden, s-ino Paula Schaufelberger el Zuriĥo, s-ro Hans Bickel el Horgen, s-ino Anna Gerber el Berno, s-ino Helen De Sassi el Zuriĥo.

Claude Gacond dankas al nia prezidantino por tiu raporto kaj malfermas la diskuton:

Regionaj semajnfinoj:

- Anĝelo Mellini informas, ke alemana semajnfino supozeble povos okazi en novembro 1996 en Lucerno.
- Nicole Margot invitas al la romanda semajnfino en Cully, la 6-an kaj 7-an de septembro 1996. La preleganto estos Gerrit Berveling, vicprezidanto de Akademio de Esperanto.
- En Ticino estos la semajnfino denove laŭ tradicio meze de februaro 1997.

Claude Gacond atentigas, ke la dua simpozio de CDELI okazos la 1-an, 2-an, 3-an de novembro 1996 kaj estus avantaĝe, se ne tro da aranĝoj okazus je tro proksimaj datoj.

Informado:

- Pri ARGUS: La dosiero de la pasinta jaro estis kompilita de la patrino de Claude Gacond kiel dum la pasintaj 30 jaroj. Ni ricevis sufiĉe rapide la artikolojn, kaj Claude Gacond povis tuj reagi al negativaj artikoloj, ne pli ol 1 procento. Estas dezirate ke ĉiuj SES-anoj sendu artikolojn de la gazetoj al CDELI, sed necesas absolute ke estu indikitaj la nomo de la gazeto kaj la ekzakta dato. Tiamaniere oni povas ankaŭ kontroli ARGUS.
- Depost iom da tempo Didi Weidmann faras ĉiutagan informadon en Internet kaj konstatis, ke jam centoj da personoj legis tiun hejmpaĝon. Claude Gacond deziras ke estu kunlaboro kun CDELI por ke ankaŭ tiuj Internet-informoj povu esti registritaj kaj konservitaj.
- Claude Gacond estas kontenta kaj dankas, ke la rilatoj inter SES kaj KCE estas tre bonaj kaj agrablaj.
- Post demando de Nicole Bérout Perla Martinelli klarigas detale la rilatojn inter SES/GEP/KCE/CDELI.
- Nicole Margot opinias, ke la ŝanĝo de la financaj rilatoj inter KCE/ GEP/SES devus esti decidataj de la GK de SES.

Laŭ Giorgio Silfer tio nur necesus, se la membraro voĉdonos mal-favore al la morala raporto.

Agado 2003:

- Claude Gacond raportas ke la minilibro, enkonduka kurso al esperanto, kune kun la modernaspektaj dokumentoj por agado 2003 kaj kasedo estos pretaj antaŭ 2003, eble ankoraŭ en 1996
- Kongreso de 2003 en Svislando. Estis proponita Ĝenevo, sed la tuta ideo devas esti funde preparolita. Nur estas sondado kaj lanĉo de ideo. 2002/2003 estis la fondiĝo de SES kaj la esperantiĝo de la 2 grandaj pioniroj Hodler kaj Privat.
- Giorgio Silfer diras ke la asembleo tamen devas sin esprimi pri unu punkto: nome, ĉu la asembleo trovas, ke la invito de Universala Kongreso al Svislando povas esti inter la iniciatoj inkluzivitaj sub la nomo agado 2003. La asembleo samtempe

komisias la komitaton komenci la sondadon kaj post unu jaro reveni al la asembleo kun preciza propono.

Voĉdono:

La punkto "pago de la luo al SES por GEP" kiel parto de la morala raporto estas akceptita kun *19 jes, 1 ne, 2 sindetenoj*.

La moralan raporton de la prezidantino la asembleo aprobas *unuanime, 2 sindetenoj*.

## 5. Financa raporto

La financa raporto kaj la raporto de la kaskontrolantoj aperis en SI n-ro 2/1996.

- Pri la buĝeto 1995 Mireille Grosjean bedaŭras ke oni ne uzis monon por plia varbado.
- Pri ŝia demando rilate al varbsumo, kiu estas ĉe Claude Gacond la kasisto Ernst von May respondas, ke en la jaro 1992 li transdonis al Claude Gacond CHF1500.-- por varbadagadoj, kiel la mini-gramatiko. Por demonstri ke ĉi-tiu sumo ankoraŭ apartenas al SES, li metis ĝin en la kapitalon; Claude Gacond devas raporti al li pri la uzo de tiu mono.
- Giorgio Silber miras pri la buĝeto 1996 por SI, kiu estas la sama sumo kiel por 1995, kvankam la ekspedokostoj kreskas.
- La prezidantino demonstras ke oni ŝparis diversmaniere, ankaŭ ĉe la elspezoj pri varbado, kiel ekzemple la publikado de la rezultoj de la merkataka seminario estis farita kiel speciala numero de SI, anstataŭ multekosta libreto.
- Laŭ Mireille Grosjean varbado ne nur devas esti lertigo de Esperantistoj, sed ankaŭ informado al la vasta publiko. La prezidantino rediras, ke ni ekzemple relanĉas informilon en la tri bazaj lingvoj de Svislando, agado, kiun d-ro Carlevaro faras kaj SES finansas. Plia ideo: Ĉu ni lanĉu premion? SES povas konsideri la ideon ke oni disponigu sumon por la individuo, societo, institucio, kiu prezentas la plej bonan propagandilon por Esperanto. Claude Gacond precizas, ke agadoj komenciĝis, sed la fakturoj de tiuj komencitaj agadoj alvenos ĉi-jare.
- Franz Brügger demandas, ĉu en la buĝeto 1995 la varbadsumo de CHF 3000.-- ankaŭ entenis la varbadsumon de CHF 400.-- por la tago X. La respondo de Claude Gacond estas jes. Oni atendas, ke la projekto tago X efektiviĝu. D-ro Silber deman-

das, ĉu temas pri buĝeto 95 aŭ 96. Ernst von May klarigas, ke s-ro Brügger jam ricevis parton de la CHF 400.-- kaj la cetera sumo estas entenata en la buĝeto 96.

- La kaskontrolanto Ernst Glättli memorigas ke la revizora raporto de li kaj Margrit Guldin aperis en SI n-ro 2/96 kaj ke li povas trankviligi la membraron ankaŭ rilate al la preparolita sumo de CHF 1500.-- ĉe Claude Gacond. La revizoroj povis konstati ke la librotenado estas tre zorgeme farita kaj la kontopruviloj bonege ordigitaj. Tial li kaj s-ino Guldin proponas al la GK de SES aprobi la jarkalkulon 1995, malŝarĝi la Centran Komitaton kaj aparte esprimi per forta aplaŭdo la dankon al nia fidela kasisto.

*La asembleo akceptas la financon raporton unuanime kun 1 sindeteno.*

- Ernst von May instigas ke la anoj ĉie varbu novajn membrojn por atingi la optimismen celon de la buĝeto. Li speciale mencias la fakton, ke SI povas esti ricevita sen esti membro de SES, kaj rekomendas pensi pri donacoj flanke de la membroj.
- Giorgio Silfer rekomendas al la komitato esplori aliajn solvojn por investi la monon, ĉar saĝas al li ke la interezo povus esti iomete pli granda. Same la komitato devus trovi solvojn por ŝpari ĉe la kosto de nia informilo SI.

*La buĝeto estas akceptita unuanime kun 1 sindeteno.*

**Altigo de la kotizoj por 1997 - Proponataj estas:**

<b>membreco</b>	<b>kotizo ĝis nun CHF</b>	<b>kotizo ek de la jaro 1997 CHF</b>
infanoj ĝis 18 jaroj	6.--	12.--
junuloj ĝis 26 jaroj	35.--	45.--
ceteraj membroj	60.--	70.--
geedzoj	90.--	100.--
emeritoj	35.--	45.--
geedzoj emeritaj	55.--	65.--
dumvivaj membroj	1200.--	1400.--
dumvivaj membroj emeritaj	700.--	900.--
abono al SI sen membreco	35.--	45.--

Propono venis de Franz Brügger por speciala skalo de la kotizo por dumviva membreco por emeritoj. Ni priparolos ankoraŭfoje sub la voĉdono pri la Art. 7.

La voĉdono pri la propono por la altigo de la kotizoj rezultas jene:  
*15 jes, 2 ne, 4 sindetenoj.*

## **6. Statutmodifoj**

Post funda studo de la CK kaj preparo ankaŭ helpe de s-ro Liechti la prezidantino klarigas la statutmodifojn aperigitajn en SI n-ro 2/1996. Venis propono de la Laŭzana grupo reteni la Federan Konsilion (propono 1). Nicole Margot klarigas la kialojn kaj Claude Gacond kaj Perla Martinelli donas aldonajn informojn pri la kialo de la ŝanĝoj. La ĜK detale diskutas ĉiujn proponojn, kaj la rezulto de tiu debato aperas kiel nova definitiva Statuto aldone al tiu ĉi numero de SI.

*Voĉdono pri la tuta ŝanĝo de la statuto: 13 jes, 0 ne, 1 sindeteno.*

La nova Statuto de SES estas akceptita laŭ la detalaj voĉdonoj pri la diversaj punktoj.

## **7. Esperanto-Ekzamenoj kaj diplomoj**

Claude Gacond klarigas, ke okazis kunveno de la Kultura Komisiono kaj la Estraro, kiu rezultis en la rezolucio, kiun la ĉeestantoj trovas sur la tabloj. Perla Martinelli proponas prokrasti la decidon pri la rezolucio al la proksima ĜK, ĉar restas malmultaj personoj en la salono. Mireille Grosjean kontraŭstaras kaj estas decidite daŭrigi por ke ekzamenoj povu okazi jam proksiman someron. Post laŭtleĝo de la rezolucio Claude Gacond malfermas la diskuton kaj donas klarigojn pri la alcelita ordigo de la ekzamina sistemo en Svislando, el kiu rezultas la jenaj ŝanĝoj laŭ la propono de Giorgio Silfer:

Para. 1: Forstreki "kunlabore kun la svisa ILEI sekcio"

Para. 2: Konsente kun la svisa ILEI sekcio bazo por plenumi.....

*Voĉdono: 10 jes, 4 ne, 1 sindeteno*

Sekvas la voĉdono pri akcepto de la rezolucio kaj la devo, ke "SES transdonu la taskon organizi la seminarion por decidi kiel okazos la ekzamenoj - versajne jam ek de la venonta jaro - al KCE". - *Voĉdono: 10 jes, 1 ne, 4 sindetenoj*

(daŭrigo sur paĝo 13)



## STATUTO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES)

### Art. 1 - Nomo

Svisa Esperanto-Societo (SES)

germane: Schweizerische Esperanto-Gesellschaft

france: Société suisse d'espéranto

itale: Società Esperantista Svizzera

romanĉe: Societad Svizra d'Esperanto.

### Art. 2 - Fondo

Svisa Esperanto-Societo, fondita en 1903, estas asocio en la senco de la artikoloj 60-79 de la Svisa Civila Kodo.

### Art. 3 - Celoj

Disvastigi en Svislando la lingvon Esperanto kaj ĝian kulturon.

Tiucele subteni iniciatojn, ankaŭ de aliaj esperanto-organizaĵoj svisaj, por informado kaj publikaj rilatoj favore al esperanto.

### Art. 4 - Sidejo

La jura sidejo de Svisa Esperanto-Societo estas ĉe ĝia oficiala arkivejo, nome la urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, fako CDELI.

La organiza adreso estas ĉe la Prezidanto aŭ alia persono indikita de la Estraro. La Estraro rajtas fiksi pliajn adresojn je kantona nivelo, pro informaj, publikrilataj aŭ fiskaj kaŭzoj.

### Art. 5 - Lingvo

La oficiala lingvo de Svisa Esperanto-Societo estas esperanto, laŭ la ĉi-sekvaj referencaj tekstoj: *Fundamento de Esperanto*, *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* kaj *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*.

### Art. 6 - Neŭtraleco

Svisa Esperanto-Societo estas politike kaj religie neŭtrala, respektante la principojn de *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*.

### Art. 7 - Konsisto

La membraro de Svisa Esperanto-Societo konsistas el:

a) Membroj individuaj (fizikaj personoj). Ekzistas la ĉi-sekvaj kategorioj: infanoj kaj geknaboj [ĝis 18 jaroj], junuloj [ĝis 26 jaroj], plenkreskuloj, emeritoj, geedzoj.

b) Membroj juraj, kiuj ricevas triekzemplere la informilon de SES, sed havas nur unu voĉon en la Ĝenerala Kunveno. Reprezentanto de jura membro, kiu persone havas voĉdonrajton kiel individua membro de SES, havas fakte du voĉojn: la sian kaj tiun de la reprezentata organizaĵo.

- c) Dumvivaj membroj.
- d) Honoraj membroj. Ilin elektas la Ĝenerala Kunveno laŭ propono de la Estraro.

#### **Art. 8 - Kotizoj**

- a) Membroj individuaj plenkreskaj pagas bazan jarkotizon.
- b) Infanoj aŭ geknaboj, junuloj, emeritoj kaj geedzoj pagas redukti-tan jarkotizon.
- c) Juraj membroj pagas la trioblon de la baza jarkotizo.
- d) Por esti dumviva membro oni devas unufoje pagi la 20-oblon de la baza kotizo. Por emeritoj temas pri la 20-oblo de ilia reduktita baza kotizo.
- e) Honoraj membroj kaj estraranoj ne pagas kotizon.

#### **Art. 9 - Voĉdonrajto**

La voĉdonoj en la Ĝenerala Kunveno aŭ en skriba voĉdono validas per simpla plimulto de la partoprenantaj membroj, escepte de la decidoj pri ŝanĝo en la statuto aŭ likvido. Infanoj kaj geknaboj ne havas voĉdonrajton. Ĉiu membro havas unu voĉon, escepte de la kazo en art. 7 par. B. Oni ne akceptas delegojn.

#### **Art. 10 - Administra jaro**

La administra jaro daŭras de la 1<sup>a</sup> de januaro ĝis la 31<sup>a</sup> de decembro.

#### **Art. 11 - Monrimedoj**

Ili rezultas el: a) kotizoj; b) donacoj; c) legacoj; d) agado de SES; e) subvencioj.

#### **Art. 12 - Organoj**

- a) La Ĝenerala Kunveno (ĜK)
- b) La Estraro (E)
- c) La Kaskontrolantoj (KS)
- d) La Konflikto-Komisiono (KK).

#### **Art. 13 - Decidpova Instanco**

- Ĝi estas la membraro, per
- a) Voĉdono en la Ĝenerala Kunveno
  - b) Skriba voĉdono.

#### **Art. 14 - Ĝenerala Kunveno**

La ĜK kunvenas ĉiujare en loko kaj je dato fiksita de la Estraro. Kiam ne estas anoncita tagordo, validas la sekvaj punktoj:

- a) Protokolo de la antaŭa ĜK
- b) Agadraporto de la Estraro

- c) Financa raporto de la Estraro
- d) Raporto de la Kaskontrolantoj
- e) Raporto de eventualaj komisionoj
- f) Elektaj (laŭ la ĉeso de la mandatoj, kiuj normale daŭras tri jarojn).

*Nota: Protokoloj kaj raportoj publikigitaj en la informilo de SES aŭ pere de alia rimedo ne estas laŭlegotaj.*

#### **Art. 15 - Eksterordinara ĝenerala Kunveno kaj skriba voĉdono**

Ili okazas estrardecide aŭ je postulo de almenaŭ kvinono de la membroj.

#### **Art. 16 - Estraro**

La Estraro estas la plenuma instanco de Svisa Esperanto-Societo. Ĝi konsistas el minimume kvin (maksimume sep) elektitoj fare de la Asembleo. Inter ili estas prezidanto (kies voĉo estas decida en kazo de egaleco), vicprezidanto, sekretario kaj kasisto. En la Estraro devas esti reprezentitaj almenaŭ la tri ĉefaj lingvoregionoj de Svislando.

#### **Art. 17 - Kaskontrolantoj**

La Kaskontrolantoj plenumas la taskon kontroli, konsili kaj helpi pri la librotenado, kaj raportoj pri ĝi al la ĜK. Ili estas minimume du, plus eventualaj anstataŭantoj.

#### **Art. 18 - Komisionoj**

La Estraro povas elekti komisionojn por apartaj taskoj, sed ne rajtas transdoni siajn povojn al ili, se tiun transdonon ne difinas kontrakto kun la Estraro. La konvenciitaj komisionoj raportas ne nur al la Estraro, sed ankaŭ al la Ĝenerala Kunveno. La elekto de iliaj membroj devas esti konfirmita de la ĜK.

#### **Art. 19 - Proponoj**

- a) Rajtas fari proponon la voĉdonrajtaj membroj.
- b) Por esti publikigebla en la oficiala informilo aŭ per alia rimedo kaj poste diskutata en kunveno, propono devas alveni al la Estraro almenaŭ du monatojn antaŭ la koncerna kunveno. Ĝi estu subskribita de almenaŭ tri voĉdonrajtaj membroj.
- c) En la kunveno la propono estas prezentata de la subskribintoj. Poste la prezidanto malfermas la diskuton donante la vidpunkton de la Estraro kaj proponante la akcepton aŭ rifuzon de la propono.

#### **Art. 20 - Konflikto-Komisiono**

- a) Membro nekontenta pri io ajn koncerne la vivon de la societo aŭ la aktivecon de ties respondeculoj ne rajtas plendi antaŭ tribunalo, se li/ŝi ne direktis unue sian plendon al la Konflikto-Komisiono de SES.

b) La Konflikto-Komisiono konsistas el minimume tri arbitraciantoj, kiujn elektas la Estraro, se alvenas plendo. Tiuj arbitraciantoj ne necese devas esti membroj de SES.

#### **Art. 21 - Gazeto**

SES zorgas pri liverado de periodaĵo(j) al siaj membroj. Ĝia aŭ ilia abono estas inkluzivita en la kotizo. La Estraro elektas la plej konvenan solvon kaj rilatas kun la redaktoroj. Eblas aparte aboni la informilon de SES sen esti membro. La Estraro fiksas la abonprezon kaj la anonctarifojn.

#### **Art. 22 - Membriĝo**

Membriĝo efektiviĝas per kotizpago. La Estraro rajtas rifuzi membriĝon. La rifuzito rajtas apelacii ĉe la ĜK.

#### **Art. 23 - Eksiĝo kaj eksigo**

- a) Eksiĝema membro anoncu sin antaŭ la fino de la jaro. Ne pago de kotizo signifas eksigo.
- b) La Estraro proponas al la KK la eksigon de membro, kiu agis kontraŭ la celoj de SES aŭ de la esperanto-movado ĝenerale. La eksigito rajtas apelacii al la venonta ĜK.

#### **Art. 24 - Rilatoj kun UEA**

Svisa Esperanto-Societo estas landa asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La membroj de SES, kiuj ne deziras esti registritaj kiel aligitaj membroj de UEA, povas efektiviĝi tiun deziron per skriba peto al la kasisto de SES.

#### **Art. 25 - Ŝanĝo de la statuto**

Parta aŭ tuta ŝanĝo de la statuto povas esti decidita de du trionoj de la voĉrajtaj ĉeestantoj en ĜK. La estraro povas konfidi tiun laboron al speciala komisiono.

#### **Art. 26 - Likvido de la societo**

Likvido de la societo, krom en kazo de deviga likvido laŭ la Svisa Civila Kodo (art. 77-78) eblas nur se minimume du trionoj de la voĉdonrajtaj ĉeestantoj en ĜK akceptas tiun proponon. En la kazo de likvido, la restanta havaĵo estu transdonita al alia svisa esperanto-organizaĵo.

*Statuto proponita de la SES-Estraro kaj aprobita de la Ĝenerala Kunveno en Neŭŝatelo, 1996 03 23, kiel amendo de la versio 1992 03 14*

(daŭrigo de paĝo 8)

### 8. Elekto de nova komitatano

- La prezidantino proponas David Bühlmann kiel novan komitatano de SES ĉe UEA. David Bühlmann estas *unanime elektita*.
- Sinjoro Liechti plenumis sian taskon kiel redaktoro de SI kaj rezignos je la fino de la jaro. Sekve ni devos elekti novan redaktoron kaj ĉiuj estas petataj helpi trovi posteulon. Perla Martinelli esprimas sian treege grandan dankon al s-ro Liechti pro la laboro farata.
- La nuna Centra Komitato fariĝis Estraro, konsistanta el 6 personoj, ĉiuj egale voĉrajtaj - valoras plimulte la prezidanto en kazo de egaleco. La oficperiodo de la nuntempa Estraro ĉesos la venontan jaron.

### 9. Diversaĵoj:

Ĉu sine de la agado 2003 ni ekzamenu la eblecon okazigi la UK en la jaro 2003?

*Voĉdono: 12 jes, 0 ne, 3 sindetenoj*

- Mireille Grosjean informas, ke dum kongreso pri lingvoj en la universitato de Neuchâtel en marto okazis du prelegoj pri Esperanto sekve al ŝia iniciato
- en la universitato de Neuchâtel estas grupo da lingvistoj al kiu ŝi apartenas, kiu pripensas tre fruan instruon pri fremdaj lingvoj. Ŝi estas invitita prelegi pri la propedeŭtika valoro de Esperanto en tiu grupo, kiu estas influriĉa en la programado de lingvoinstruado.

Giorgio Silfer memorigas la proponon donitan al la prezidantino rilate al la demando, ĉu UEA akceptu novan landan asocion de lando, kie jam ekzistas landa asocio. Ĉar la propono alvenis tro malfrue por esti akceptita, d-ro Silfer laŭtlege ĝin kiel rekomendon. "La Generala Kunveno de SES kunsidante en Neuchâtel la 23-an de marto 1996, konstatinte ke multiĝas la kazoj de aliĝpetoj al UEA kiel memstara landa asocio fare de societoj kies teritorioj ne koincidas kun ŝtato, kie eventuale jam ekzistas landa asocio;

rimarkinte, ke se ankaŭ en Svislando oni sekvus tiun tendencon, teorie eblus havi eĉ 23 aliĝpetojn de landaj asocioj al UEA; rekomendas al la komitato de UEA decidi pri la akcepto de nova landa asocio nur se la aliĝpeton akompanas folio kun la subskriboj de la individuaj membroj de UEA rezidantaj en la koncernata teritorio, tiel ke la absoluta plimulto de la individuaj UEA-anoj aprobu la ideon aparteni al la nova landa asocio kaj tiel implicate apogu la aliĝpeton."

Claude Gacond finas sian taskon kiel tagprezidanto kun danko kaj esprimas la deziron, ke estonte oni dediĉu tutan tagon al la ĜK kaj ne kunigu ĝin kun aliaj aranĝoj. Li speciale kore dankas la prezidantaron pro la tutjara dediĉema laboro.

Post mallongaj adiaŭaj vortoj de la prezidantino kun danko al la ĉeestantoj pro la partopreno, la Ĝenerala Kunveno 1996 finiĝas.

Fino de la kunveno: 16h02.

1996 05 24: Protokolis Sonja Brun kaj Anĝelo Mellini

oo0oo

### ENPAGILO POR AGADO 2003

En SES INFORMAS n-ro 5/96 estis artikolo pri AGADO 2003 kun la peto al subteno. Bedaŭrinde mankis la konforma enpagilo, ne pro forgeso, sed ĉar jam estis enpagilo por la Kultura Semajnfino en Luzern, kaj du enpagiloj en la sama numero ne estas rekomendindaj. Tial vi trovas tian en la nuna numero 6/96 por AGADO 2003.

-La redakcio-

oo0oo

## **René-William PERRENOUD**

*Esp / NE*

\* 23-10-1904 *Le Locle NE*

+ 30-07-1996 *Neuchâtel*

**Pr.** Post la lernejoj en Le Locle kaj Tavannes, kie vivis liaj gepatroj, Perrenoud vizitis la gimnazion kaj universitaton en Neuchâtel, kie li licenciĝis pri komercaj sciencoj. Junaĝe li restadis ankaŭ en Germanio (Baden-Baden kaj Bremen) por ekposedi la germanan lingvon. En la sekva tempo, li asistis sian patron en ties maŝinofabriko en Tavannes kaj en St-Quentin (Francio, 1929-35) kiel direktora sekretario. Post tio li helpis al la patrino → Louise Perrenoud-Jeaneret viviĝi privatan lernejon en Neuchâtel, kie oni instruis la francan lingvon kaj la dommastrumadon al fremdlingvaj junulinoj. Daŭrigante la patrinan entreprenon, Perrenoud, kiu estis ankaŭ svisa oficiro, gvide aktivadis sur ĉi tiu kampo dum la 35 jaroj. De 1970 li loĝis en Haute-rive/NE.

**Pl.** Ĉar lia patrino praktikis E-on ekde la jarcenta komenco, ankaŭ Perrenoud uzis ĝin de 1907 kaj malgraŭ diversaj agadinterrompoj neniam perdis la intereson pri la zamenhofa lingvo, ĉiam denove perfektigante siajn konojn kiel en la vesperaj E-kursoj de → Paul Humberst (1916) aŭ dum la armea servo en 1939 per la lernolibroj de → Edmond Privat. Post paŭzo li revenis al la E-movado en 1951, studante la lingvon en kurso de → William Perrenoud laŭ ties metodo *En tempo rekorda*. Lia nomkolego, kiu neniel estis lia parenco, instigis lin aktivadi por la neŭŝatela EG kiel kasisto, sekretario kaj bibliotekisto - ĉi tiujn funkciojn li plenumadis dum pli ol 30 jaroj. Kiam William Perrenoud estis prezidanto de *SES*, René-William alektiĝis kiel protokolanto kaj kasisto (1952-74). En 1963/64 li apartenis al la triopo, kiu kolektive prezidis la landan asocion. Kiel bona konanto de la germana lingvo, dum pli ol 20 jaroj li francigis la germanlingvajn tekstojn aperintajn sub la titolo *E-Information*, redaktatajn de → Arthur Baur. Ekde 1955 Perrenoud estis membro de *UEA* kaj ekde 1957 ĝia neŭŝatela delegito. En 1958 li troviĝis inter la fondaj membroj de *EES*. Kiam en 1968 *KCE* estis starigita, Perrenoud aktive kunlaboris kun → August Braun kaj → Claude Gacand kaj ĝis 1988 funkciis kiel librotenisto de *KCE* kaj *GEP*.

*Kompilis Andy Künzli por Svisa Planlingva Enciklopedio*

## DE KONGRESFAKO DE KOOPERATIVO DE LITERATURA FOIRO

(Judit Felszeghy, estrino)

Inter la 5-a kaj la 9-a de julio kun sukceso disvolviĝis la 15-a Internacia Literatura Forumo, dediĉita al la temo "Esperanto-teatro - cent jarojn poste", en la pitoreska hungara urbeto Eger.

Pli ol 70 partoprenantoj el ok landoj ĝuis la teatran etoson kaj konatiĝis kun la esperantlingva teatra arto per la altnivelaj prelegoj de Zofia Banet-Fornalowa, Belka Beleva, Georges Lagrange kaj Ljubomir Trifonĉovski.

La repertuaron de la spektakloj plenumis kaj profesiaj kaj amatoraj geartistoj, kiel la Bulgara Esperanto-Teatro, Jerzy Fornal, Andres Bickel, Studio "P" - reprezentante vastajn eblojn pri surscenigo en diversaj formoj.

Esperanta PEN-Centro jam la trian fojon dum la Internaciaj Literaturaj Forumoj trovis la okazon por diskuto kun la lokaj verkistoj - ĉi-foje niaj gastoj estis la vicprezidantino de la Hungara PEN-Centro, Eva Tòth, kaj hungaraj geaktoroj, pri la signifo de teatro en minora lingvo.

En la vasteco de la kulturaj programoj la ĉeestantoj tamen havis la okazon konatiĝi ankaŭ kun la ĉarma, baroka urbeto (kie samtempe abundis diversaj muzikaj programoj), kaj dum duontaga ekskurso kun la plej signifa Nacia Parko en Hungario.

Pri la evento donis informojn la landaj ĵurnaloj, kaj sekvis la programon la loka radio kaj televido per intervjuoj.

La Forumon organizis la Kongresfako de LF-koop, kunlabore kun la Esperanta PEN-Centro kaj la Esperantista grupo de Eger.

Por pliaj informoj vi povos turni vin al la Kongresfako de LF-koop (adreso: c/o EPC PF 117, H-1581 Budapest, tel + Fakso +36 1 1834 084.)



## GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

Jen grava informo:

En majo 1997 en la sudgermanaj urboj Aalen kaj Stuttgart okazos la **"Eùropa Esperanta Kultura Semajno"**, kiu konsistas el tri sinsekvaj aranĝoj: Esperanta Kultura Festivalo en Aalen, Eùropa Junulara Parlamento kaj Eùrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart.

Ĉar venontjare la Universala Kongreso okazos ekster Eùropo tiu aranĝo certe estos **la plej granda Esperanto-Kongreso en Eùropo en 1997** - ni atendas pli ol 500 partoprenantojn.

Sekve kelkaj pliaj informoj:

La **Esperanta Kultura Festivalo** (10-13/05/1997) okazos laŭ **eksplicita invito de la urbo Aalen**, kiu ankaŭ jam dum multaj jaroj subvencias la Germanan Esperanto-Bibliotekon kaj ĝi **ankaŭ finance subtenos la Festivalon**. Jam estas certa, ke ĉeestos ĝin **Kajto kaj Ĵomart kaj Nataŝa**.

La **Eùropa junulara Parlamento** (13-16/05/1997) allogu speciale junajn Gesperantistojn. Ĝi estos finance subtenata de la Germana ŝtato kaj de komercaj sponsoroj, tiel ke ni esperas povi repagi almenaŭ parton de la vojaĝkostoj al la partoprenontoj. En la programo estas antaŭvidata diskuto kun la **Prezidanto de Junaj Eùropaj Federalistoj (JEF)**, kun reprezentantoj de **amnesty international, greenpeace kaj politikistoj de diversaj partioj**.

La **Eùrop-Unia Esperanto-Kongreso** (16-19/05/1997) estas la **komuna kongreso** de la asocioj de Aŭstrio, Belgio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Portugalio (10 landoj). Speciale

invitataj estas al ĉeesto ankaŭ la samideanoj el orienta Eŭropo. Programeroj estos i.a. pri la **strukturo de EU kaj ĝia lingvopolitiko, pri la mon-unio en EU, pri la pligrandigo al oriento.** Estas certa jam la ĉeesto de almenaŭ unu **deputito de Eŭropa Parlamento.**

La Eŭropa Junulara Parlamento kaj la Eŭropunia Esperanto-Kongreso okazos en la "Haus der Wirtschaft" (Domo de l'komerco) **en la centro de Stuttgart.**

La **kostoj por hoteloj** en Stuttgart kaj Aalen estas ekde ĉ. GM 40.- por unu persono kaj unu nokto. Ni provos provizi lokojn en junulargastejo (en urbocentro) ankaŭ por pliaĝuloj. -FS-  
(La unua bulteno ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS).

oo0oo

## I L T I S - E L D O N E J O

Estimataj gesamideanoj,

Dum multaj jaroj niaj libroj estis vendataj per la libro-servo de Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds. Bedaŭrinde tio ne plu eblas. Tial ni skribas rekte al ĉiuj esperantistoj en Svislando por informi pri nia eldona agado kaj por inviti al subteno de nia entrepreno per mendoj. Nia libro-servo disponigas ne nur novajn eldonojn, sed povas oferti ampleksan sortimenton de brokantaj libroj kaj revuoj ne plu aĉetebblaj ali-loke. Petu nian katalogon. (ĝi estas ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS).

---

### INFORMO AL LA LEGANTOJ:

La protokolo kaj la statuto kavas proprajn paĝonumerigojn, sed supre en la mezo estas la paĝonumerigo de la kompleta informilo. -FL-

## GRUPAJ INFORMOJ

### ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

En Altersheim Neubað.

28.11.20.00h Monata Kunveno: Prelegos s-ro  
Claude Gacond

14.12.20.00h Zamenhofa festo en Basel

### TRILANDA REGIONO:

7.12. Zamenhofa festo en Basel

7/8.6.97 Trilanda Renkontiĝo kaj svis-  
germana semajnfino.

### BELLINZONA:

Ni kunvenas ĉiam la duan sabaton en Viale  
Motta 32, 6500 Bellinzona.

9.11.17.00h kaj 14.12.17.00h

### ESPERANTO-SOCIETO BERN:

La 1-an mardon monate, en restoracio AL  
FORNO, Spitalgasse 37.

5.11.19.30 kaj 3.12.19.30h.

### ESPERANTORONDO BIELO:

En restoracio Migros, Neumarkt, Bielo 3.  
Ĉiun ĵaŭdon 18.00 - 19.00h.

### LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO/LES

En restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr.8 en  
Emmenbrücke, kun escepto de BIG BEN.

13.11.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big  
BEN. Gvido Franz Brügger.

28.11.20.00h Monata Kunveno: Kompilado de  
nia programo por la jaro 1997.

11.12.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big  
BEN. Gvido Franz Brügger.

### ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:

Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ  
ebleco de la membroj.

### LAÛSANA ESPERANTO-SOCIETO:

4.11. Anita Altherr, "VILAGA VIVO EN TRIESTA KARSTO  
KARSTO" estas ŝtoneca regiono ĉirkaŭ Trieste kun  
ĉarmaj ŝtonkonstruitaj vilaĝoj. En tiu regiono, meze

PP  
8053 Zürich

---

de sovaĝa naturo oni ankoraŭ parolas Slovene.

15.12.1996: Zamenhofa festo.

6.1.1997: Claude Gacond: "Ĉu Esperanto vere havas 16 gramatikajn regulojn?"

**ESPERANTOKLUBO WIL:**

En restoracio Schweizerhof, Untere Bahnhofstrasse 18.

13.11.20.00h S-ro Pochanke raportos pri la 81-a UK en Prago, kun lumbildoj.

11.12.20.00h Zamenhofa vespero.

**ESPERANTO-SOCIETO ZÜRICH:**

En la propra kunvenejo en Eisengasse 22.

11.11.19.15h Monata kunveno

25.11.19.15h Lingvaj ekzercoj kaj libera kunveno.

9.12.19.15h Zamenhoffesto.

oo0oo

Al ĉiuj legantoj kaj geamikoj ni deziras solenan

Kristnaskon kaj feliĉan novan jaron.

SES KAJ LA REDAKCIO

DE SES INFORMAS

---

Limdato por kontribuajtoj al SES INFORMAS 1/97 estas la 3-a de decembro 1996.

---

Red-Adreso: Fritz Liechti Wiesliacher 17  
8053 Zürich. Tel: 01/381 77 13